# INTERFRATIĜO

BULTENO


de la Ligo Katolika Esperantista Belga


Kroma numero okaze de la 750-a datreveno
de la urbo BERINGEN

**TRIMONATA REVUO - NUMERO 14-A JULIO 1989**

*PERIODIQUE TRIMESTRIEL - DRIEMAANDELIJKS TIJDSCHRIFT*
*Aven. Gén. Eisenhower 123 - 1030 Bruselo.*







# BERINGEN

## ★ 750 JAROJ ★





Tiu numero de "Interfratiĝo" estas speciale eldonita por rememorigi vin aŭ inviti vin al la "Internacia Limburga Esperanto Tago" en Beringen, kiu okazos la 19-an de aŭgusto 1989, por festi la **750**-an jarigon de la ekesto de la urbo. Multaj eksterlandanoj estas atendataj. Kaj vi mem!

**La programo estas la jena:**

9.30h. **Alveno sur la granda placo** en Beringen Centro (aŭtomobile, aŭtobuse, bicikle, piede, ktp.).

9.45h. Kiel esperantistoj, ni estos akceptataj de **la urbestraro**.

10.00h. De tie ni iros al la **karbminejo de Beringen** por ĝin viziti; unika okazo!
Jen la programeto:
- Projekcio de malgranda **filmo** pri la minejoj (daŭro 20 minutoj)
- Vizito de la **maŝinejo**
- Le **ŝaktoj** kaj la **minejo mem** (Ne forgesu pluki peceton da karbo, kiel memoraĵo...)
- La **minfornoj** ("la infero").

12.00h. **Tagmanĝo** en hotelo "Casino" apud la minejo.

14.00h. Promenado tra la famkonata valo "**de Zwarte Beek**". Tiu havas propran faŭnon kaj flaŭron. Gvidanto kaj klariganto estos frato De Ruyver.
Se la vetero devus esti malbona, projekcio de lumbildoj, prezentataj de la sama, pri papilioj kaj fungoj.

17.15h. Libertempo aŭ **meso**, kun homelio en Esperanto, en la kapeleto de pilgrimloko.

18.00h. **Vespermanĝo** en loka restaŭracio.
Post la vespermanĝo, en sama ejo: "Tricini, la Magisto **kun la blua ŝtono**" donos prezenton dum pli ol unu horo (magio-prestidigitado).

---

Por helpi la organizantojn, oni pli bone sendu al la sekretario, Bob Rombaut, la apudan mendilon kaj prefereble pagu la sumon de 600BFr popersone (tag- kaj vespermanĝo entenataj) al lia pĉk 235-0082388-47.

**Mi ĉeestos al la INTERNACIA LIMBURGA ESPERANTO tago en Beringen, Belgio.**

Mi mendas tag-kaj vespermanĝon. Mi pagos 600 b.fr. al Bob Rombaut, Zandhoefstraat 156, 3940. Beringen.
postĉ : 235-0082388-47.

Nomo ..................................................

adreso ..................................................

..................................................

Loĝloko ..................................................

Lando ..................................................

Mi pagos antaŭ la 10a de aŭg. 1989.

Personoj kiuj ŝatus resti dum kelkaj tagoj en la regiono povas loĝi en Beringen urbo. Hotel «Thierbrau» Markt 17. Ili bonvolu pagi al la sekr. antaŭ la 1a, de aŭg. Kostoj de la hotelo 1000 b. fr. po nokto, matenmanĝo enkalkulita.

Eltranĉu, ni petas, kaj sendu sub koverto al la adreso indikita ĉi-dorse.

---

## MONATO EN PARIZO

Kadre de siaj konferencoj, SAT estis invitinta la 12an de februaro en Parizo la ĵurnaliston Stefan Maŭl, ĉefo de la politika servo de "Aŭgsburger Allgemeine". Ĉefredaktoro de monata revuo en Esperanto "Monato", Stefan Maŭl profitas el la kunlaborado de profesiaj- aŭ amatoraj- jurnalistoj devenaj de la lando pri kiu ili raportas. Pro tio la originaleco de la artikoloj koncerne la enhavo kaj la prezento, ĉar le eventoj estas raportitaj aŭ analizitaj de lokaj homoj, ne tra la prismo de alilandanaj ĵurnalistoj kaj fremduloj je la kulturo.

Al tiu novaĵo kaj komentario en "Franca Esperantisto" ni povas aldoni ke foje raportas en Monato nia ĉina amiko Zhe.

## PILGRIMADO EN BANNEUX

La dektria internacia pilgrimado en Banneux okazos la dimanĉon 10-an de septembro 1989. La temo estas la kompreniĝo inter la popoloj. La kompleta programo kaj atentigoj por la pripenso en la venonta numero de Interfratiĝo kiu eliros ĉirkaŭ la 25-an de aŭgusto.

ESPERANTO KLUBO BERINGEN.

p/a. Bob. Rombaut. ir
Zandhoefstr 156.
3940. Beringen. Belgio.

**KONSCIIGA KAMPANJO PER GLUMARKOJ.**

La celo de tiu kampanjo estas konsciigi al Esperanto la larĝan publikon pere de inĝenia sistemo de disvastigo de glumarkoj. Jen la sistemo: oni donacas al amikoj kaj konatoj unu glumarkon kaj... unu mendilon per kiu la ricevinto povas siavice mendi kelkajn glumarkojn por ilin donaci al siaj propraj amikoj kaj konatuloj.

Tiu glumarko, kiu estas blua, montras (vidu dekstren) la rondon de la eŭropaj steletoj kun la simbolo de la centjariĝo de Esperanto. Grave estas ke oni gluu tiun markon en preciza loko: la supra dekstra angulo de la malantaŭa vitro de sia aŭtomobilo. La preciza loko kaj la blua kolorpunkto devus iĝi ĉe la publiko signalo signifikante "Eŭropo-Esperanto".

La espero de la asocio kiu lanĉis tiun kampanjon estas ke precipe esperantistoj sukcesos disvastigi la ideon en ĝenerala publiko, tiel ke la politikistoj ekkonsciu pri la premo flanke de liaj elektantoj.

Petu senpagan glumarkon ĉe "Espeŭrop", Van Elewijkstr. 25, B-1810 Wemmel. Oni povas mendi kromajn (8 malgrandajn aŭ 5 grandajn modelojn) per pago de 100BEF al poŝtĝirkonto 000-0239566-73 de nia amiko Eugène Collet, B-1711 Itterbeek.

EUR + ESPERANTO

GRATIS — ESPEUROP VAN ELEWIJCK 35 B 1810 WEMMEL ✆ 02-460 49 84

**Lieu de dépôt: Bruxelles 3, section 2**
Verantwoordelijke uitgever: Raymond Lecat, adres van het tijdschrift.